— Ne ĝenu cin, amiĉjo! Mi pensas, ke ci estas laca, kio estas tre nature post la malkvieta tago. Kuŝiĝu la sofon. Kaj ĉesu „vii“ min, diru al mi simple „ci“. Kiu „vias“ sian edzinjon, amiĉjo? Ĉar ci edziĝos min, mia koro? Ci ja publike eldiris la deziron edziĝi la Veron? Aŭ ne?

Mi sentis formikojn kuri sur la dorso kaj glacion kuŝi sur la koro.

— Mi nenion havas kontraŭ, se ci volos edziĝi min eĉ hodiaŭ, — daŭrigis la ostaro kun rideto, kiu rigidigis mian sangon. Eĉ tuj, se ci volas! Ni ja ne bezonas pastron, tiun superstiĉidon de fetiĉismo, aŭ antaŭanoncon al la polico, tiun ĉi fungon de la societo. Prenu min, prenu la puran Veron en ĝia nudeco!

Ŝi denove saltis al mi.

Mi reĵetiĝis kun krio de teruro Ŝi haltis, larĝe malfermis kaj pufigis la marĉo-ran-kolorajn okulojn kaj atente rigardis min.

— Ci ŝajnas timi min?... Ĉu eble ke ci ne amas min? Ĉu la Vero ne estis la objekto de ciaj revoj, la idolo de ciaj sentoj, la kulmina punkto de cia celado?.. Ho! Ĉu eble?... Ci sekve mensogis al la malfeliĉa popolo, kiu naive fidante kaj admirante cin, starigis cin, kiel sian gvidiston?.. Ho! — ekkriis ŝi plende, borante min per siaj teruraj okuloj. — Ci ne volas min? Ci ne volas min? Ci trovas min malbela, min, la eternan Veron, kiu donas al la homaro la humanecon kaj al Dio la diecon, min, ekster kiu nenio ekzistas krom la kruda materio, min, kiu, se oni min posedas, donas la posedon de la universo?...

Mi nenion respondis. La formikoj daŭrigis kuri sur mia dorso.

— Ci trovas mian eksteraĵon malbela, ci malfeliĉa? Sed ci ja ne volas orumitajn pilolojn? Ci komprenas, ke la Vero ne estus Vero, se ĝi estus falsita. Ci timas miajn longajn kaj akrajn dentojn? Sed la kapitalistoj ne amas kaj ne subtenas min, kiakaŭze mi malsatas kiel lupo, al kiu decas havi longajn kaj akrajn dentojn por povi mordi krudan manĝon. Miaj okuloj estas kotkoloraj kaj malklaraj? Sed mi ĉiam ploras mian malfeliĉon, kaj la larmoj difektis ilian antaŭan koloron. Mia brusto estas plata kiel tabulo? Sed ĉu oni povas ĝui agrablan korpulentecon kaj plaĉantan rondecon, kiam oni kondukas malsatan vivon de cigano, de senloĝejulo, havante nenion por manĝi, nenion por pagi rifuĝejon? Sed ne timu amiĉjo! Malgraŭ ĉio mi estas sana, pura, senmakula. La estonto apartenas al ni. Ne estas malproksime la tago, kiam aliaj venos por baki en nia forno, kaj tiam ci vidos, ke miaj ulceroj malaperos, ke miaj okuloj lazuriĝos, ke miaj dentoj malgrandiĝos kaj blankiĝos, ke mia korpo rondiĝos. Nu, mia eĉjo, ne faru kaprican vizaĝon! Donu kiseton al cia edzinjeto! Mi ĵuras ami cin eterne...

Kaj la monstro metis la kapon sur mian ŝultron.

Tiu ĉi tuŝo saltigis min. En paroksismo de malespero mi kuris al la kontraŭa muro kaj kaŝis la vizaĝon en la manoj. Post mi aŭdiĝis ĝemo de doloro kaj de ofendita sento.

Kelkaj momentoj pasis silente. Subite post la pordo aŭdiĝis mallaŭta frapo. Tio ĉi min revivigis. Kia feliĉa savanto venis al mia helpo?

Mi jam malfermis la buŝon por inviti la frapinton, kiam mia koŝmaro diris duonvoĉe:

— Mi petegas cin, amiĉjo, ne respondu! Oni venas por malhelpi nin. Se ci nenion respondos, oni pensos, ke ci forestas, kaj oni foriros. Cia novedzino havas ja la rajton postuli, ke nia miela monato ne estu interrompata de enuigaj vizitantoj? Silentu, mi petegas cin, mi antaŭsentas malfeliĉon.

Sed mi ne volis ŝin aŭdi. Mi estis feliĉa povi enirigi kiun ajn, eĉ la diablon mem. Tial mi krude depuŝis la virinon kaj ekkriis plengorĝe:

— Eniru, mi petas!

En la ĉambro aperis La Granda Falsisto en sia propra persono. Malpli ol ion ajn mi atendis lian viziton. Sed li ankaŭ estis bonvenanto.

— Saluton, kamarado! — diris li kun sia ordinara ridaĉo. — Mi venis por scii, ĉu vi ne bezonas mian arton. Ha!... Kiun vi havas ĉe vi?

Antaŭ miaj okuloj malvolviĝis stranga sceno. La Granda Falsisto fikse kaj akre rigardis la virinon, kies ĉiuj membroj skuiĝis de febro. Tamen ŝi siavice gluis al li siajn okulojn, kiuj brilis tiel fulmoplene, ke la kanajlo, kies senhohteco delonge pasigis la kolonojn de Herkulo, eksentis embarason. Cetere tio ĉi ne daŭris longe. Li malice ekridetis kaj turniĝis al mi:

-- Mi gratulas vin je via trovaĵo! — li diris. — Vi havas la sopiritan Veron en ĝia plena natureco! Amuzetu vin kun ĝi! Ha-ha-ha. Mi pensas, ke lia ministra moŝto, s-ro Vandalo, al kiu mi havas fari hodiaŭ viziton, pasigos bonan kvaronhoron, kiam mi rakontos al li, ke vi havas tiun ĉi Veron en ĝia nudeco! Mi proponas al vi anonci en la ruĝaj gazetoj, ke vi posedas la vivantan Veron.

— Iru al la diablo kune kun via Vandalo kaj kun tiu ĉi Vero! — ekkriis mi furioze. — Oni venas por min maltrankviligi en mia loĝejo, kaj oni faras al mi nepetatajn proponojn!

— Kiel? Vi rifuzas deteni la Veron?— demandis la falsisto mirante. — Ha!.. Cetere, la kreaĵo estas sufiĉe malbela, kaj oni ne amas tiaĵon, se ĝi eĉ estas la Vero... Ha-ha-ha! Kaj vi trumpetis esti amanto de la Vero, de la Vero en ĝia nudeco! Ha-ha-ha! Kial do vi ne rapidas detiri la abaĵuron de via suno? Ha-ha-ha! Al vi ne mankas gusto, kvankam vi estas ĵurinta demagogo, — daŭrigis li, alirante al la tremanta virino kaj senceremonie puŝante la fingron al ŝia vizaĝo. — Certe, tiuj ĉi puf-okuloj ne povas meti flamon en la animon. Tiu ĉi krokodilĉja buŝeto ne prezenas magneton aŭ korkroĉilon. La stangetoj de tiuj ĉi dentoj ne ŝajnas esti perloj kaj la nekompareblaj variolpunktoj ne similas la „muŝojn", kiuj havis famon en la kortego de la lastaj francaj reĝoj. Sed ne malĝoju! Vi havas min kaj mian arton al via servo. Mi estas preta ĉieligi tiujn okulaĉojn, perligi tiujn ostostangojn, rondigi tiun platon ktp. Post sep tagoj mi komplete riparos ŝin, kaj vi ricevos tian peceton ke vi lavos al ŝi la piedojn kaj trinkos la akvon. Mi faros ĝin, mi ĵuras per mia amiko Vandalo! Post sep tagoj! Nu, — diris li turniĝinte al la virino, — ni iru!

— Ne lasu lin preni min, amiko! — ŝi petegis kun plendanta voĉo. — Li volas pereigi min. Li estas falsisto, kiu ĉiam celis nigrigi min. Se ci donas min al lia dispono, mi estas perdita.

— Ne babilu sensencaĵojn, abomena ksantipo!— krude ekkriis la dekoraciisto.— Mi volas fari plezuron al mia kamarado kaj ripari cin por ke ci plaĉu al li. Ci ja timigus la inferon mem per cia masko. Ĉu ci efektive pensas ke cia lupa faŭko estas buŝo, ke ciaj vidilaĉoj estas okuloj, ke ciaj ulceroj estas vangofosetoj, ke cia tabulo estas brusto? Rigardu ciajn piedojn! Ili similas la irilojn de cikonio. Ĉu tio konvenas al virino? Ni iru!

Li kaptis ŝin je la mano. La virino akre ekkriis kaj rigardis min petokule. Mi sentis min malbone.

— Ne lasu min esti fortirata de ci, mia koro, mia animo! Ne lasu min! En la nomo de cia publika konfeso, en la nomo de ciaj eternaj idealoj, savu min de tiu ĉi monstro! Savu min, mia dolĉulo, mia kolombo!

Mi staris senmova, kaj mi estis kiel vangofrapata de tiuj ĉi krioj de sufero, de ŝia petema rigardo, plena je riproĉo, je timo, je malespero. Mi deturniĝis.

(*Daŭrigo sekvos*).

A Kofman

La ĉefa trunko.

(Fabeleto).

Antaŭ pli ol dudek jaroj en unu ĝardeno falis sur la teron malgranda semeto de arbo el la plej nobla speco. La tero ĝin ame akceptis. La semo ekĝermis, kaj baldaŭ eliĝis delikata verda trunketo. Sed la superteraj kondiĉoj estis malfavoraj por la malforta planteto. Grandaj arboj baris la sunon al la noveveninto. Sed la radiko de la mirinda kreskaĵo estis sufiĉe forta. Ĝi sendis diversflanken subterajn trunkojn el sia hejma ĝardeno en la apudajn ĝardenojn, en kiuj ili eliĝis el la tero, kiel flankaj trunkoj de komuna radiko. Trovinte sufiĉe bonajn lokojn, sufiĉe da sunvarmo, ili baldaŭ fariĝis belaj arbetoj, jam ekportantaj siajn unuajn rikoltojn de belaj, delikataj fruktoj. Dume la malforta ĉefa trunketo en la hejma ĝardeno ne pereis. Inter la ĝardenistoj troviĝis homoj, kiuj, kvankam ne havante la povon dehaki la malbelajn arbojn, barantajn la sunon al la delikata ĝerminto, tamen zorgis pri ĝi kaj penadis deturni la ombrigantajn branĉojn, kaj ĝi iom post iom tre malrapide kresketis, kelkafoje ne altiĝante dum tutaj jaroj.

Sed subite forta ventego forrompis kaj forŝiris kelkajn el tiuj branĉoj, kaj iom pli da viviga sunlumo ekpenetris al la paleverda trunketo; tuj ĝi komencis kreski pli rapide.

Karaj ĝardenistoj de la feliĉaj ĝardenoj, vi, kiuj jam havas fortikajn arbetojn nun estas via devo helpi al flegantoj de la ĉefa trunko same, kiel ili helpadis al vi per konsiloj kaj kunlaborado en viaj zorgoj pri la flankaj elŝprucaĵoj de la komuna ĉefa radiko.

Subtenu do la ĉefan trunkon de la tutmonda arbo de l'verda stelo.

* * *

Vivu, kresku, floru la „*Pola Esperantisto*"! Konsideru ĝin ĉiuj esperantistoj ne nur kiel polan nacian gazeton esperantan, sed kiel *nacian esperantistan gazeton de la tuta esperantistaro!* Vivu la ĉefa trunko de la esperanta arbo! Ho ĉu baldaŭ ni kunvenos sub ĝia dolĉa ombro!

Romano Frenkiel.

---

100 proverboj el la „Proverbaro" de M. Zamenhof

elektitaj kaj grupigitaj de D-ro K. Bein.

I. La sorto.

Venkas ne forto, venkas la sorto.
Kiun la sorto karesas, al tiu ĉio sukcesas.
Al feliĉulo eĉ koko donas ovojn.
Hodiaŭ forto, morgaŭ morto.
Se decidos la sorto, helpos nenia forto.

II. La riĉeco kaj mizero.

Al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas.
Apud plena manĝotablo, ĉiu estas tre afabla,
Kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne ko-
[lektas.
Riĉa zorgas pri ĉampano, malriĉa pri pano.
Oni vivas ne kun mono, sed kun persono.
Granda doto kaj oro, sed mankas la koro.
Festeno kaj ĉaso kaj da ŝuldoj amaso.
Se malriĉulo sukcesas, li ĉiujn forgesas.
Titolo sen mono—sensignifa sono.
Fremda mizero ne estas sufero.
Mizero faras viziton, ne atendante inviton.
Manko de oro ne estas malhonoro.
Pli bona virto sen oro, ol oro sen honoro.
Pli efike ol bato pelas malsato.
Vivo sen modero kondukas al mizero.
Bona gloro pli valoras ol oro.
Vivu stomako laŭ stato de l' sako.

III. La edziĝo.

Stelu malproksime, edziĝu proksime.
Oni vivas ne kun mono, sed kun persono.
Granda doto kaj oro, sed mankas la koro.

(Daŭrigo sekvos).

Preĝo sub la verda Standardo. *)

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta;
Al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro,
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron,
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon,
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

L. Zamenhof

Modlitwa pod zielonym Sztandarem.

Do Ciebie, Potęgo bez kształtów, nieznana,
Dzierżąca ten świat Tajemnico,
Miłości i prawdy Krynico świetlana
I życia ciągłego Krynico....
Do Ciebie, przez wszystkich widziana odmiennie,
Lecz w sercach odczuta jednako płomiennie,
Do Ciebie, coś dla nas twórczości wyrazem
Modlimy się razem.

Nie wązki szowinizm do Ciebie tu woła,
Nie ślepych dogmatów moc głucha....
Spór ludów, religij ucichnął tu zgoła,
Tu serce płomieniem wybucha....
Z tą wiarą w moc serca u wszystkich jednaką,
Z tą prawdą jedynej najwyższą oznaką
My, syny ludzkości, zwracamy dziś twarze
Przed Twoje ołtarze.

Toć ludzkość powstała, jak braci gromada...
Cóż węzły w niej bratnie rozplata?!
Przecz, naród na naród okrutnie napada?
Brat staje się wilkiem dla brata?
Kimkolwiek więc jesteś Potęgo przemożna,
Niech wzruszy Cię szczera modlitwa pobożna,
I dzieciom skłóconym tej wielkiej ludzkości
Zwróć pokój miłości!.....

My walki i pracy się wiążem przysięgą,
My ludzkość pragniemy zjednoczyć....
Nie dozwól nam upaść Tajemna Potęgo,
Dopomóż zawady przekroczyć....
Nasz trud pobłogosław, podeprzyj staranie
I serca zapałom daj moc i wytrwanie,
Ażebyśmy czoła napaściom w złej chwili
Odważnie stawili.

Nasz sztandar zielony podniesiem wysoko,
Przed piękna i dobra ołtarze....
I świata Tajemne dostrzeże nas oko
I drogę nam blaskiem pokaże....
I wstrząsną się mury śród ludów wiekowe
Od huku ich pójdą odgłosy echowe
I miłość i prawda, gdy one upadną,
Na ziemi zawładną!...

Przełożył

Leo Belmont

*) Hymn ten, wypowiedziany przez D-ra L. L. Zamenhofa na I kongresie, umieszczamy na żądanie naszych nowych prenumeratorów.

Kronika. — Kroniko.

O IV Kongresie Esperanckim w Dreznie.

Jak donosiliśmy w poprzednich №№ „E. P.“ czwarty kongres rozpocznie się dnia 16 Sierpnia i trwać będzie 6 dni. W Dreznie wre obecnie robota koło przygotowań do tego kongresu. Liczba przyszłych uczestników tego zjazdu wszechświatowego szybko się powiększa. Można się spodziewać, że liczebnie będzie on nawet większy niż zjazd w Cambridge. Z ostatnich wiadomości, które otrzymaliśmy z Drezna, są dwie bardzo poważnej doniosłości.

Przedewszystkim komitet organizacyjny otrzymał od Saskiego Zarządu Królewskiego pozwolenie na korzystanie ze wspaniałych ubikacji Instytutu Technicznego dla zebrań kongresowych; jest to jeden z piękniejszych gmachów tego miasta, posiadający wiele dużych salonów, gdzie będą mogły wygodnie odbywać się posiedzenia różnych sekcji.

Druga wiadomość dotyczy przedstawień teatralnych w języku esperanckim. Znakomity aktor Emanuel Reicher, występujący stale ze swą trupą w teatrze Lessinga, przyrzekł dać przedstawienie w jęz. esperanto podczas kongresu w Dreznie. Wybrał on sztukę Goethego „Ifigenja w Taurydzie“, która będzie graną w przekładzie samego twórcy języka Esperanto.

Rzecz jasna, że trupa taka nie może wystąpić zupełnie bezinteresownie, dla tego też komitet organizacyjny zwraca się do esperantystów, aby zechcieli materjalnie podtrzymać ten doniosły dla nas czynnik propagandy przez zamówienie biletu do teatru;—cena biletu oznaczona na 20 Mrk. Nadsyłający tę sumę wcześniej otrzymają lepsze miejsca. Zwracamy się do naszych czytelników z prośbą podtrzymania tego przedsięwzięcia, gdyż, jeżeli próba w Dreznie powiedzie się, p. Reicher ma zamiar ze swoją trupą objechać wszystkie większe miasta Europy. Tym, którzy nie zapisali się jeszcze na listę uczestników naszego kongresu, podajemy adres komitetu organizacyjnego: Altona nad Elbą, Markstrasse 68. Składka wynosi 5 rb.

Pri la IV Kongreso Esperantista en Drezdeno.

Kiel ni jam raportis en la antaŭaj №№ de „P. E.“ la kvara kongreso komenciĝos la 16-an de Aŭgusto kaj daŭros 6 tagojn. En Drezdeno bolas nun prepara laboro al tiu ĉi kongreso. La nombro de partoprenontoj en tiu ĉi tutmonda kongreso kreskas rapide. Oni povas esperi, ke kvante ĝi estos pli granda ol la kongreso en Cambridge El la lastaj sciigoj, kiujn ni ricevis el Drezdeno, estas du kun tre grava signifo.

Antaŭĉio la organiza komitato ricevis de la Reĝa Saksa Registaro permeson uzi por la kongresaj kunvenoj belegajn ĉambrojn de la „Teknika Supera Lernejo“; — ĝi estas unu el la plej belaj konstruaĵoj de tiu ĉi urbo, posedanta multajn salonojn, kie povas oportune okazi kunsidoj de diversaj sekcioj.

La dua sciigo rilatas la teatran prezentadon en Esperanto. La fama aktoro Emanuel Reicher, kiu ludas konstante kun sia aktoraro en Lessing'a Teatro, promesis doni teatra, prezentadon en Esperanto dum la Drezdena kongreso. Li elektis la belan verkon de Goethe „Ifigenio en Taurido, kiu estos ludita en la traduko de la kreinto de Esperanto. Kompreneble, ke tia aktoraro ne povas ludi tute senrekompence, kaj tial la organiza komitato turnas sin al esperantistoj, kun peto ke ili bonvolu subteni materiale tiun ĉi tre gravan por ni propagandilon per antaŭmendo de biletoj en la teatron; — oni metis prezon de 20 Mrk. por 1 bileto. Personoj, kiuj alsendos tiun ĉi sumon pli frue, ricevos pli bonan lokon. Ni turnas nin al niaj legantoj kun la peto subteni tiun ĉi entreprenon, ĉar se tiu ĉi provo sukcesos, s-ro Reicher intencas kun sia anaro ĉirkaŭvojaĝi la plej grandajn urbojn de Eŭropo. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne enskribiĝis en la liston de partoprenontoj en nia kongreso, ni donas ĉi tie la adreson de la organiza komitato: Altona a/E. Markstrasse 68. La kotizaĵo estas 5 rb.

Ruch esperancki w Polsce.

Od Zarządu Warsz. Tow. Esper.

Początek roku 1908 zaznaczył się 2-ma pomyślnemi dla Towarzystwa faktami: a) otrzymaniem dawno oczekiwanego zatwierdzenia Ustawy „Polskiego Towarzystwa Esperantystów“ z główną siedzibą w Warszawie i z prawem otwierania oddziałów w całym Królestwie Polskim, i b) otrzymaniem oficjalnego pozwolenia na systematyczne urządzanie wykładów w lokalu Towarzystwa. Oba te fakty mieć będą niewątpliwie ogromne znaczenie dla rozwoju języka Esperanto w Warszawie i na prowincji. Wszyst-

Pola esperantista movado.

De la komitato de la Vars. Esperan. Societo.

La komenco de la jaro 1908 enskribiĝis per 2 favoraj faktoj por la Societo: a) per konfirmo de la regularo, jam de longe atendita, de „La Pola Societo Esperantista“ kun ĉefa sidejo en Varsovio kaj kun rajto malfermi filiojn en la tuta Polujo kaj b) per la ricevo de oficiala permeso por sistema organizado de kursoj en la loĝejo de la Societo. Ambaŭ ĉi tiuj faktoj havos sendube grandan signifon por la disvastigado de Esperanto en Varsovio kaj en la provincoj. Tial ĉiuj zorgoj de la komitato estas direktitaj nun al la plej rapida or-

kie też usiłowania Zarządu Towarzystwa skierowane są obecnie ku jaknajszybszemu urządzeniu oddziałów prowincjonalnych i kursów języka Esperanto.

Zarząd odbył w Lutym i Marcu 4 posiedzenia, na których zapadły następujące uchwały:

1) Wobec zatwierdzenia Ustawy Polskiego Tow. Esperantystów w Warszawie wydrukować 1000 odbitek tej ustawy, rozesłać je członkom Towarzystwa i zwołać następnie Ogólne Nadzwyczajne Zebranie w celu utworzenia nowego Towarzystwa.

2) Zaprosić na miesięczne zwykłe zebranie 6 kwietnia 1908 r. delegatów prowincjonalnych celem omówienia sprawy oddziałów prowincjonalnych.

3) Rozpocząć wykłady systematyczne języka Esperanto 16 Kwietnia; równolegle będą prowadzone 2 kursy: wyższy i niższy; każdy kurs składać się będzie z 10 wykładów; serja wykładów kosztować będzie 1 rubla dla członków Towarzystwa, 1½ rubla dla niecżłonków. Zapisy na wykłady przyjmuje Sekretarz Towarzystwa, D-r Nauman, Koszykowa 7, telefon 187.

4) Zakupić książek do bibljoteki Towarzystwa za 100 rubli, po jednym egzemplarzu najważniejszych utworów, które się w języku esperanckim ukazały, a których jeszcze Bibljoteka Tow. nie posiada. Książki te, po oprawieniu i zakatalogowaniu, będą wypożyczane członkom Towarzystwa.

5) Urządzić codzienne dyżury w kancelarji Towarzystwa od 8 do 9 wieczorem (w Niedziele od 5 do 6 popoł.); w tym czasie udzielane są wszelkie informacje, przyjmowane zapisy na członków, opłaty członkowskie i t. p.

6) Urządzać co Czwartek, w lokalu przy ul. Zgoda 4, zebrania towarzyskie, mające głównie na celu wprawianie się w rozmowę w języku Esperanto; prócz tego od czasu do czasu urządzane będą na tych zebraniach spiewy solowe i chóralne, wspólne czytanie, deklamacje i t. d. Członkowie Towarzystwa proszeni są o liczne przybywanie.

7) Utworzyć kółko dramatyczne, które mogłoby z czasem wystawiać publicznie sztuki w języku Esperanto. Zapisy przyjmuje sekretarz Towarzystwa, Dr. Róbin, Senatorska 30, telefon 73—01.

8) Sprowadzić z Hawru gwiazdki i sprzedawać je członkom Towarzystwa.

9) Urządzić 30 Marca egzamin na dyplom esperancki. Egzamin ten oddbył się już w obecności D-ra L. L. Zamenhofa i dał doskonałe wyniki: wszyscy kandydaci wykazali zupełną znajomość języka Esperanto i otrzymają dyplom. Egzaminowi poddali się: pan Czerwiński, p. Juraszek, p. Koziara, p. Mędrkiewicz, p. Ossowski, panna Roszkowska i p. Rybczyński.

10) Ustanowić jako ostatni termin nadsyłania prac na konkurs dzień 15 Maja 1908 r. Prace należy nadsyłać do Sekretarjatu Towarzystwa.

Prezes Tow.
A. Grabowski.

Sekretarz
Dr. W. Robin.

ganizo de provincaj filioj kaj kursoj de la lingvo Esperanto.

La komitato havis en Februaro kaj Marto 4 kunvenojn, en kiuj oni akceptis la sekvantajn decidojn.

1) Okaze de la rajtigita regularo de la Pola Esperantista Societo presigi 1000 ekzemplerojn de tiu ĉi regularo, dissendi ilin al la membroj de la Societo kaj kunvoki la sekvantan ĝeneralan eksterordinaran kunvenon por malfermi la novan Societon.

2) Inviti al la monata ordinara kunveno de la 6-a de Aprilo 1908 provincajn delegitojn por priparoli la aferojn de provincaj filioj.

3) Komenci sistemajn kursojn de Esperanto la 16-an de Aprilo; estos organizataj du paralelaj kursoj: komenca kaj supera; ĉiu kurso konsistos el 10 lecionoj; la serio de 10 lecionoj kostos 1 rub. por la membroj de la Societo kaj 1½ rb. por la nemembroj. Enskribojn por la kursoj akceptas la sekretario de la Societo D-ro Nauman, Koszykowa 7, telefono 187.

4) Aĉeti librojn por 100 rubloj, po unu ekzemplero de la plej gravaj verkoj, kiuj aperis en Esperanto, kaj kiujn la Societo ankoraŭ ne posedas. Kiam tiuj ĉi libroj estos binditaj kaj enskribitaj en la katalogon—pruntedonadi por legado al la membroj de la Societo.

5) Organizi ĉiutagajn deĵorojn en la kancelario de la Societo de 8 ĝis 9-a horo vespere (Dimanĉe de 5 ĝis 6); en tiuj ĉi horoj estas donataj informoj, akceptataj membraj enskriboj, kotizaĵoj k. t. p.

6) Aranĝi ĉiuĵaŭde en la loĝejo ĉe la strato Zgoda № 4 vesperkunvenojn Societajn speciale por ekzercado en la esperanta interparolado; krom tio de tempo al tempo estas aranĝotoj dun tiuj ĉi kunvenoj kantoj solistaj kaj koraj, komunaj legadoj, deklamoj k. t. p. La societanoj estas petataj alvenadi are.

7) Organizi draman rondeton, kiu povus en estonto publike doni teatrajn prezentadojn en Esperanto. Enskribon akceptas la Sekretario de la Societo D-ro Robin, Senatorska 30, tef. 73—01.

8) Alvenigi el Havro steletojn kaj disvendadi ilin al la Societanoj.

9) Aranĝi la 30-an de Marto ekzamenon por esperantista diplomo. Tiu ĉi ekzameno okazis jam kun la ĉeesto de dro L. L. Zamenhof kaj donis bonegajn rezultatojn: ĉiuj 7 kandidatoj elmontris plenan sciadon de Esperanto kaj ricevos la diplomon. Ekzamenitaj estis: s-ro Czerwiński, s-ro Juraszek, s-ro Koziara, s-ro Mędrkiewicz, s-ro Ossowski ŝ-ino Roszkowska kaj s-ro Rybczyński.

10) Difini kiel lastan terminon por la konkursaj verkoj la tagon de 15-a Majo 1908. La verkojn oni devas alsendi al la sekretariejo de la Societo.

Prezidanto de la Societo
A. Grabowski.

Sekretario
D-ro W. Robin.

— Dnia 6-go Kwietnia o godz. 8 wiecz. odbyło ogólne zebranie „W. T. E.“ Przybyło 5 delegatów z prowincji: p-nowie Ender i Lipski, jako przedstawiciele Łodzi, p. Mechowicki—Piotrkowa, p. Guliński—Zambrowa, p. Knapski jako przedstawiciel Zgierza i Tomaszowa. Posiedzenie rozpoczął p. Belmont dłuższym przemówieniem o Esperancie. Nie możemy tu przytoczyć nawet części tego, co rozwinął mówca przed słuchaczami. Mówił on o historji i ewolucji idei jęz. międzynarodowego, zanalizował najpoważniejsze próby jego wykonania i w końcu energicznemi słowy zaprotestował przeciw wszystkim reformom, mówiąc, że cała siła Esperanta opiera się głównie na niezłomnej jakoby religijnej wierze wszystkich esperantystów w przyszłość Esperanta. Obecni oklaskami dziękowali prelegientowi za jego piękną pouczającą mowę.

Drugą część wypełniły sprawy Towarzystwa i omawianie sposobów otwierania oddziałów prowincjonalnych. Delegaci przedstawili ruch esperantystyczny w swoich miastach i wreszcie zaproponowano członkom „W. T. E.“ przystąpić do nowego „Polskiego Towarzystwa Esperantystów”.

Piotrków: Siew Esperantyzmu plonuje i u nas. Idziemy naprzód, chcąc zrównać się z wielką armją bojowników pokoju, harmonji wszechludzkiej, braterstwa ludów. W naszej głuchej prowincji na wieść o wielkiej, wzniosłej idei języka międzynarodowego, żywiej zabiły serca, otwarły się głowy ludzi młodych, ludzi jeszcze nie wyjałowionych przez głusz prowincji; otwarły się oczy i ciekawie zajrzały do książek esperanckich. Jedyne wychodzące w Piotrkowie pismo postępowe „Echa Piotrkowskie” zamieściły znakomity artykuł o języku międzynarodowym pióra naszego piotrkowskiego leadera p. M. Mechowickiego. Artykuł jeden z tych, co budzą, co nie pozostają bez echa.

Zorganizowało się kółko młodzieży z zapałem studjującej Esperanto; wykłady prowadzi p. Vogel, który wydał propagacyjny prospekt gramatyki esperanckiej. P. Woroniecki i Vogel krzątają się koło urządzenia Wieczornicy esperanckiej w Piotrk. Tow. Muzycznym. Będziemy więc słyszeli w deklamacji i śpiewie piękny język Esperanto.

M. Cz.

Częstochowa. P. Leon Mańkowski, inżynjer, donosi nam o szybkim postępie Esperanta w tym mieście. Liczba sympatyków naszej idei wzrasta tu z każdym dniem. P. Mańkowski rozpoczął wykłady Esperanta w tutejszym gimnazjum.

— O takim samym powodzeniu Esperanta donoszą nam z Grójca, Będzina, Żyrardowa, Dąbrowy, Ostrołęki; w tym ostatnim mieście p. Eugienjusz Srzednicki miał odczyt o jęz. Esperanto w teatrze miejskim wobec 140 słuchaczy.

— La 6-an de Aprilo je la 8 horo vespere okazis ĝenerala kunveno de la „V. E. S.“ Alvenis 5 provincaj delegitoj: S-ro Ender kaj Lipski, kiel reprezentantoj de la urbo Łodź, s-ro Mechowicki de Piotrków, s-ro Guliński de Zambrów, s-ro Knapski, kiel reprezentanto de Tomaszów kaj Zgierz. La kunvenon malfermis s-ro Belmont la vic-prezidanto de la „V. E. S.“ per granda parolado pri Esperanto. Ni ne povas citi eĉ parton de tio, kion la parolinto disvolvis antaŭ la aŭskultantaro. Li parolis pri la historio kaj evolucio de la ideo de lingvo internacia, analizis plej gravajn provojn de ĝia efektivigo kaj fine per energiaj vortoj protestis kontraŭ ĉiuj „reformoj“, dirante, ke la tuta forto de Esperanto apogas sin precipe sur la firma kvazaŭ religia kredo de la esperantistaro pri la estonteco de Esperanto. La ĉeestintoj per aplaŭdoj dankis al la preleginto por lia bela kaj instrua parolado.

La duan parton okupis la aferoj de la Societo kaj oni priparolis la agmanieron de la tuja fondo de provincaj filioj. La delegitoj prezentis la movadon esperantistan en siaj urboj kaj fine oni proponis al la membroj de la „V. E. S.“ aliĝi al la nova „Pola Esperantista Societo.“

Piotrkovo. La semado de Esperantismo donas fruktojn ankaŭ ĉe ni. Ni iras antaŭen, volante egaliĝi kun la granda militista armeo de paco kaj tuthomara frateco de popoloj. En nia surda provinco ĉe la ekscio pri la nobla ideo de lingvo internacia ekbatis pli vive la koroj, malfermiĝis la kapoj de junaj homoj, de homoj ne tute ankoraŭ surdigitaj per la apatio de provincoj; malfermiĝis la okuloj kaj scivole enrigardis en esperantajn librojn. La sola progresa gazeto eliranta en Piotrkovo „Eĥoj Piotrkovaj” presis bonegan artikolon pri la lingvo internacia, skribitan de nia Piotrkova lidero s-ro M. Mechowicki (Meĥovicki).— unu el tiuj artikoloj, kiuj ne restas sen e o. Organiziĝis rondeto de junularo fervore studanta Esperanton; la kursojn kondukas s-ro Vogel, kiu eldonis propagandan prospekton de l' esperanta gramatiko. S-ro Voroniecki kaj Vogel klopodas pri la aranĝo de esperantista vesperkunveno en la Piotrkova Muzika Societo. Ni aŭdos do deklamatan kaj kantatan la belan lingvon Esperanto.

M. Cz.

Częstochowa (Ĉenstoĥova). S-ro Leon Mańkowski, inĝeniero, sciigas al ni pri la rapida progreso de Esperanto en tiu ĉi urbo. La nombro da simpatiantoj kun nia ideo kreskas ĉiutage. S-ro Mańkowski komencis kursojn de Esperanto en ĉi tiea gimnazio.

— Pri tia sama sukceso de Esperanto oni sciigas al ni el Grójec (Grujec), Będzin (Bendzin), Żyrardów (Ĵirarduv), Ostrołęki (Ostrolenka); en tiu lasta urbo s-ro Eug. Srzednicki havis paroladon pri Esperanto en la urba teatro, kie ĉeestis 140 aŭskultintoj.

Kronika różnokrajowa.

Francja. W imieniu Kamila Flammariona p. Rollet de l' Isle, inżynjer naczelny marynarki francuzkiej, zawiadamia w „Paris-Esperanto”, że

Diverslanda kroniko.

Francujo. En la nomo de Camille Flammarion, S-ro Rollet de l' Isle, ĉefinĝeniero de la Franca Maristaro sciigas en „Paris Esperanto“,

znakomity astronom nie upoważnił nikogo do tłómaczenia dzieł jego na jakikolwiek bądź język międzynarodowy oprócz na jęz. Esperanto tak, jak on jest ustalony przez zasadnicze prawidła d-ra Zamenhofa. Przypuszczamy, że odezwa ta została wywołana czyimś zamiarem przekładu dzieł znakomitego uczonego na jakiś inny język sztuczny.

Esperanto w policji. Pan Miguière, inspektor policji paryskiej stara się wprowadzić Esperanto do policyjnych stosunków międzynawych. Zgodnie z upoważnieniem paryskiego szefa policji zawiązał on stosunki z panem Ahlbergiem, naczelnikiem policji w Sztokholmie dla założenia grup policjantów-esperantystów w Paryżu i Sztokholmie oraz „Międzynarodowego esperanckiego towarzystwa policyjnego". Prócz tego zwrócił się on w tej samej sprawie, również do przedstawicieli policji w innych krajach, i wielu już wyraziło gotowość poprzeć jego inicjatywę. Można więc się spedziewać, że wkrótce zobaczymy na ulicach wszystkich miast europejskich policjantów z zielonemi gwiazdkami dla informowania cudzoziemców.

Rosja. W ostatnim czasie sprawa nasza w Rosji posuwa się szybko naprzód. Głównie rozpowszechnia się Esperanto wśród młodzieży. Kółko członków Petersburskiego Uniwersytetu, którego prezesem jest znany lingwista Baudoin de Courtenay, rozszerza się. W uniwersytecie wywieszone są esperanckie zawiadomienia, ogłoszenia oraz ilustracje. W Petersburskim Politechnicznym Instytucie pracuje grupa esperantystów, których liczba przed dwoma miesiącami wynosiła 40 osób. Taka sama grupa tworzy się również w „Instytucie Leśnym". Studenci urządzają systematyczne kursy. Donoszą nam również o takiej samej agitacji na Uniwersytecie Kijowskim i Charkowskim.

Moskwa, która przez dłuższy czas była obojętną dla naszej sprawy, obecnie budzi się i energicznie szerzy propagandę Esperanta. Komitet tutejszego towarzystwa wybrany na rok 1908 składa się: z prezesa — d-ra N. Kabanowa, wiceprezesa — p. G. Smirnowa, sekretarzy: p. p. R. Mencela i A. Sacharowa; skarbnika — p. A. Stupina, bibliotekarza — p. W. Mencela. Jako konsulowie na Moskwę zostali obrani p. A. Smirnow, (ul. Staraja Basmanaja, dom Kudriawcewa, m. 12) i p. L. Titov (Zamoskworeczje, Zaczejski tupik, dom Andronowa, m. 1).

Holandja. P. Bruijn projektuje założenie w Hadze „Esperanckiej centralnej księgarni, wydawnictwa i konsulatu", jako anonimowe towarzystwo akcyjne. Akcję będą po 25 do 100 guldenów holenderskich (20,5—82 rs.). Połowa zysków przeznacza się na propagandę Esperanta. Projektodawca ma nadzieję, że jeśli wszyscy esperantyści i przyjaciele postępu będą chcieli nabywać książki za pośrednictwem tej międzynarodowej instytucji, to mogą być osiągnięte znaczne zyski. Trzy osoby (komisarze) wybrane przez akcjonarjuszów kontrolować będą całe przedsięwzięcie. Zapisywać się można i otrzymywać szczegółowe informacje u p. J. L. Brujin (Holandja, Haaga, Kepplerstraat 170).

Danja. W Kopenhadze założone zostało „Międzynarodowe Zjednoczenie kobiet" (21 listop.

ke la fama astronemiisto donis al neniu rajton traduki liajn verkojn en iun ajn internacian lingvon, escepte Esperanton, sed tian, kia ĝi estas laŭ la fundamentaj reguloj, starigitaj de D-ro Zamenhof. Ni supozas, ke tiu ĉi anonco estas elvokita pro ies intenco traduki verkojn de la fama scienculo en iun alian artan lingvon.

Esperanto en polico. S-ro Miguière inspektoro de l' pariza polico penas enkonduki Esperanton en la internaciajn policajn interrilatojn. Laŭ permeso de la pariza policestro, li interkonsentis kun S-ro Ahlberg, policestro en Stokholmo pri fondo de policistaj grupoj esperantaj en Parizo kaj en Stokholmo kaj „Internacia Polica Asocio Esperantista". Krom tio li demandis jam pri tiu sama afero aliajn eksterlandajn policestrojn kaj multaj jam esprimis sian konsenton subteni lian iniciativon. Ni do povas esperi, ke baldaŭ ni vidos sur la stratoj de ĉiuj Europaj urboj policistojn kun verdaj steletaj informontajn fremdulojn.

Rusujo. En la lasta tempo nia afero en Rusujo iras rapide antaŭen. Precipe disvolviĝas Esperanto inter la junularo. La rondo de la membroj de la St. Peter. Universitato, kies prezidanto estas la eminenta lingvisto Baudouin de Courtenay, pligrandiĝas. En la Universitato estas elpendigta granda vitraĵo kun esperantistaj anoncoj, avizoj kaj ilustraĵoj. En la St. Pet. Politeknika Instituto laboras grupo de esperantistoj, kiu antaŭ du monatoj kalkulis 40 membroj. Tia sama grupo formiĝis en la „Arbara Instituto". La studentaro aranĝas sistemajn kursojn. Oni sciigas nin pri tiu sama agado en la Kieva kaj Ĥarkova Universitatoj.

Moskvo, kiu longe estis preskaŭ indiferenta por nia afero, nun vekiĝas kaj energie propagandas Esperanton. La komitato de ĉi-tiea Societo elektita por la jaro 1908 konsistas el: la prezidanto — D-ro N. Kabanov, la vic-prezidanto — s-ro G. Smirnov, la sekretarioj: s-ro R. Mencel kaj s-ro A. Sa..arov, la kasisto — s-ro A. Stupin, la bibliotekisto — s-ro V. Mencel. Kiel konsuloj por Moskvo estis elektitaj s-ro A. Smirnov (str. Staraja Basmanaja, domo de Kudriavcev, loĝ 12) kaj s-ro L. Titov (Zamoskvoreĉje, Zaĉepskij tupik, domo de Andronov. loĝ 1).

Hollando. S-ro Bruijn projektas fondon en Hago de „Esperanta Centra Librejo, eldonejo kaj konsulejo" kiel anonima societo akcia. Akcioj po 25 ĝis 100 guld. (20,5—82 sm.). La duono da profitoj estos oferita por propagando de Esperanto. La projektanto esperas, ke se ĉiuj Esperantistoj kaj amikoj de progreso volus aĉeti ĉiujn librojn per tiu ĉi internacia oficejo, povus esti atingitaj grandaj profitoj. Tri personoj (komisarioj) elektitaj de la akciuloj kontrolos la tutan entreprenon. Oni povas enskribi sin kaj ricevi detalajn informojn ĉe s-ro J. L. Brujin (Hollando, Hago Kepplerstraat 170).

Danujo. En Kopenhago estas fondita „Internacia virina Unuiĝo" (la 21-an de Novembro

1907 r.), które zaprasza do zapisywania się na członków. Składka roczna — 1 korona (51 kop.). Sekretarką jest p. Gunvar Monster (Dana Esp. Oficejo, 5. B. Osterbrogade, Kopenhaga).

— Na prośbę zarządu miasta w Odense, p. Fryderyk Skeel-Giorling miał 19-go stycznia w ratuszu wykład o języku międzynarodowym. Liczni zebrani wysłuchali z dużym zaciekawieniem odczytu i wielu z nich zapisało się do miejscowego towarzystwa esperantystów, które zbiera się w wykwintnych salonach „Industripalaet".

Stany Zjednoczone. P. Edmund Privat, nasz dobrze znany szwajcarski młody współideowiec, odbywa obecnie wielką podróż propagacyjną przez Stany Zjednoczone. Z listów jego, regularnie nadsyłanych do „Revuo", dowiadujemy się o jego zadziwiająco owocnej działalności.

